


# LA SKOLTA MONDO

OFICIALA ORGANO DE LA SKOLTA ESPERANTISTA LIGO



SKOLTA ESPERANTISTA LIGO  
(fondita en 1918)

CENTRA KOMITATO

Prezidanto: L.J. VAN GULCK, Wolfjagerslei 40, Bergerhout, Antwerpen, Belgujo  
Vicprezidanto: DOUGLAS MURPHY, 7 Constable Road, Ipswich, Anglujo  
Sekretario: C. STANLEY OTTO, 7 Langview Road, Livingston, N.J., Usono  
Kasisto: DAVID H. WITHEY, 21 Brookfield Avenue, Waterloo, Liverpool 22, Anglujo



Saluton!

Oni diras pri skoltoj, ke: "Se io estas malfacila, ni tion faras tuj; se io estas neebla, ni bezonas iom da tempo." Jen kio montriĝis.

Montriĝis malfacile eldoni nian "Skolta Mondo"n en la korekta tempo. La materialo por la printempa numero estis jam preta, sendita al Anglujo por presigo, kiam la presejo informis, ke ĝi ne plu povas presigi la revuon.

Kiam ni pripensas, ke la laboron faras skoltestroj, kiuj ne nur havas sian profesion laboron, sed ankaŭ la libertempan skoltestran laboron, vi certe povas kompreni, ke la situacio ne estis luma.

Tamen: Sukceso! "La skolta mondo" aperis, la printempa numero kun priskribo de katamarano, en la fina parto de la somero. Ni petas pardonon kaj komprenemon.

Ankaŭ rilate la romanon ni petas pardonon. La intenco, ke tiuj paĝoj estu elpreneblaj, por ke vi poste povu ilin kolekti kaj bindigi al kajero kun nur la rakonto, ne plu estas realigebla. Ni do lasas la ideon dum tiu ĉi rakonto "kuras", sed revenos al ĝi poste.


Pro la nesufiĉa tempo ni nun eldonas duoblan numeron, la nuna estas "somera kaj aŭtuna", kaj en oktobro/novembro ni revenos kun nia vintra. Poste ni esperas regule kaj ĉiame elsendi kvar numerojn en la jaro.


Maldekstramane via

Hans Amund.

Ĉu vi kolektas poŝtmarkojn? Se jes, vi jam scias ĉi tion, se ne, bonvolu pripensi:

Al kolektantoj poŝtmarkoj estas valoraj se ili estas sendifektaj. Ofte alvenas leteroj kun poŝtmarko gluita tute ĉe la rando. Tiam ĝi ne plu estas sendifekta! Tial, skolto, memoru ĉiam havi almenaŭ  $\frac{1}{2}$  cm inter poŝtmarko kaj leterrando!





OFICIALA ORGANO DE LA SKOLTA ESPERANTISTA LIGO

56157

VOLUMO III Numero 9/10 (55/56)

Somero/Aŭtuno 1964

La prezidanto parolas:

La redaktejo de "La Skolta Mondo" flugis al Norvegujo.

Dum iom pli ol du jaroj L.S.M. estis redaktita de niaj du skoltfratoj, Stanley Otto kaj David Withey, kune. Sed tiu situacio ne povis daŭri, ĉar ambaŭ havas sufiĉe da laboro kaj petis ŝanĝon. Ni trovis preta por transpreni la taskon nian bone konatan N.R. por Norvegujo, Hans Amund Rosbach - kiu ek de pasinta numero estas ĉefredaktoro. Mi tutkore dankas lin pro lia preteco, kaj kredas, ke nia revuo estas en bonaj manoj. La administracion daŭre prizorgas la kasisto, David Withey, kiu ricevos la abonmonon. Artikolojn, kontribuojn k.c. oni sendu rekte al P.M. Rosbach, Follidal - kiu ankaŭ deziras kunlaborantojn. Kompreneble mi ŝatas danki ege al Otto kaj Withey, kiuj faris ĉion eblan por eldoni L.S.M., kio ja ne ĉiam estis facila afero. Esperu ni, ke la estonto pliboniĝos.

J. Van Gulck.

Kurt van Rossem Hulstijn forlasis nin kiel

Kontinenta Re prezentanto por Eŭropo.

Estas kun granda bedaŭro, ke ni devas sciigi al vi la ĉisupran novaĵon. Kurage kaj kun granda dinamiko li akceptis tiun taskon, kvankam liaj universitataj studoj por apotekisto malebligis ofte plenan sindonemon. Tamen li trovis la tempon entuziasme ekkomenci la organizadon - en 1963 jam - de SEL-tendaro en 1964 en sia bela lando. Post plenplanaj klopodoj li sukcesis akiri la kunhelpon de la Ĉefskolto de Nederlando, s-ro Volkmaers, kiu estas

ankaŭ membro de la Monda Oficejo de Skoltismo, kaj kiu promesis plenan subtenon al nia amiko Kurt por la starigo de la SEL-tendaro.

Kurt ne ŝparis ĉiujn klopodojn, sed ne sukcesis komuniki sian entuziasmon al la esperantistaj skoltoj en la mondo. Nur kelkaj dekoj da skoltoj enskribigis por la tendaro, sed ne sufiĉe por-kun sukceso-starigi la SEL-tendaron. Kurt do devis rezigni la tendaron, kio certe lasis malbonan impreson sur s-ro Volkmaers. Per tio ni perdis multvaloran subtenon.

Ĉiu, kiu jam havis okazon ĉeesti en Internacia Skolt-konferenco de la Monda Oficejo de Skoltismo, spertis, ke en tiu medio oni staras antaŭ pli dika muro ol la ĉina muro.. Kajnun nia nederlanda skoltfrato atingis sukceson en tiu alta skoltmedio, sed vidis forfali ĝin - eble por longa tempo.

Kaj tamen ni antaŭeniras sen perdi kuragon, ĉar nia laboro estas pionira laboro, kies fruktojn rikoltos tiuj kiuj venos post ni.

Kurt! Vi donis al ni ekzemplon, kiun ni ne forgesos, kaj pro kiu ni sincere dankas vin. La CK. de SEL deziras al vi pli grandan sukceson en via familia kaj profesia vivo.

J.V.G.

### MI MATENMANGIS KUN BADEN-POWELL!

Antaŭ multaj jaroj mi havis la okazon partopreni nacian konferencon de skoltestroj en antikva urbo York. Tien mi iris kun mia Distrikta Komisararo (mi estis tiam sekretario de nia Loka Asocio) kaj la Distrikta Komisararo de alia parto de nia Provinco.

Post komforta tranokto, ni tri eniris la mangoĉambron de la hotelo kaj elektis liberan tablon apud la fenestro kiu frontis al la urbomuroj de ĉi tiu historicia loko. Tie floris abunde aŭtunaj narcisoj, kaj la frumatena sunbrilo beligis la tagon.

Subite, kiam ni estas pretaj por manĝi, ĉiuj en la homplena salono ekstarigis, kaj ni turnis nin por rigardi....kaj jen, eniras la Ĉefskolto mem! Kvazaŭ laŭ jam farita antaŭarango, Baden-Powell trairis senhezite la ĉambron, preterpasis aliajn tablojn kaj alvenis al nia kvarpersona tablo, kie troviĝis nur tri homoj! Indikante la kvaran sidlokon li petis: "Ĉu mi sidu ĉi tie?"

Mi havis la tute neatenditan honoron sidi tuj apud BP Spite de tio, ke mi forgesis kion ni manĝis tiuokaze, mi bone memoras pri kio ni babiladis. BP vidis sur mia uniformo la nomon de mia urbo kaj tuj petis informojn pri metodista pastro, kiu antaŭ kelka

tempo estis skribinta al li por plendi pri afero. BP volis scii, kia homo tiu estas, kaj mi ne povis ne miri, ke li tiel facile memoris ec la nomon de sia korespondinto inter tiom da poŝtaĵoj kiujn li sendube ĉiutage ricevis.

Tiu hazarda renkontiĝo kun nia kara Fondinto restas al mi bela travivaĵo.

Douglas Murphy, Britujo.

## R E C E N Z O

Skolta & Tenduma Terminaro. Kompilis J.K.Hammer. Eldonis Skolta Esperantista Ligo. 1963. 28p. 11x17,5 cm.

Kun granda intereso mi kiel iama skoltestro kaj N.A. trastudis la novan terminaron. Ĝi ricevis trebelan aspekton, bonan paperon kaj klaran preson. La formato estas plaĉa, kaj la desegnoj de la kompilinto estas bonaj kaj instruaj. La terminoj estas pritraktitaj sub diversaj temoj, do ne en alfabeto ordo. Laŭ mia opinio la kompilinto devus ellabori alfabetan indekson je la fino de la kajero. Preseraroj preskaŭ ne ekzistas, sed mi ne konsentas kun ĉiuj terminoj elektitaj. Jen kelkaj komentoj:

- p.8 Anst. 'Gilwell-Parka' group, legu 'Gilwell-Parka' grupo.  
p.11. " taga, legu ĉiutaga.  
p.12. " tendaron, legu tendaro  
p.13. " deklinado, legu dekliniĝo (Wa)<sup>\*</sup>, magneta vario (MT)<sup>\*\*</sup>.  
" centigrado, legu graduso (S)<sup>\*\*\*</sup>.  
p.19. " vagvojaĝo, legu tranokta tendekskurso.  
p.20. " tendeto, prefere: tendo por unu, por du ktp  
(Ni havas tutan registron da grandeco de tendo ekde tendo por unu ĝis cirkotendo. Mi opinias, ke oni povas uzi -eton nur se troviĝas ia speciala tendo, kiu havas alian nomon nacilingve. Komparu: lago - lageto.).  
" dreliko, legu tendotolo, tendotuko (Wa), aŭ kanvaso (KIT)<sup>\*\*\*\*</sup>. (Laŭ KIT kanvaso = tolo el lino aŭ kanabo; se el tre maldense teksitaj fadenoj oni faras sur ĝi brodadon; dense teksitan oni uzas por veloj, tendo k.s.). Plue dreliko estas kepre teksita-kun diagonalaj strioj sur la surfaco de la ŝtofc, dum tendotuko estas tole teksita-kun horizontal-vertikalaj strioj.

- p.20 Anst. ŝnurbuklo, legu agrafoj. (Buklo ne estas ilo, eble la kompilinto pensis pri buko).
- p.20,21." tertapiŝo, legu tendotapiŝo (Wa).
- p.21 " ternajlo, legu tendonajlo (Wa), tendokojno.
- p.22 " petrolea, legu petrola.
- " lanterna glaso, legu lanterna vitro, Glason oni uzas por trinki!
- " elektra lanterno, legu poŝlanterno.
- " komutilo, legu ŝaltilo (S). Komutilo turnas la elektran kurenton.
- p " baloneto, legu ampolo (Wa)
- " jamoj, legu piedoj. Jamojn oni uzas versfarante!
- " gasforno, legu gasaparato, gaskuirilo.
- p.23 " trifosta, legu tristang(et)a, tribastona. Foston oni ne povas uzi en tiu ĉi senco, ĉar fosto ĉiam estas vertikala kaj multe pli dika, solida kaj longa.
- " dreliko, legu tendotolo, tendotuko.
- p.24 " pot-breto, teler-krado, tas-arbo, prefere pot-rako, teler-rako(Wa), tas-rako.
- " radranda, legu radronda (PV)
- " skatol-bremso, legu tambur-bremso, cilin-drobremso.
- p.25 " ŝtaŭbkovrilo, legu pedalmantelo. (La vorto ŝtaŭbo ankoraŭ ne ekzistas en Esp., ni uzas la vorton polvo).
- " pedalbrako, prefere kranko (PV)
- " rad-rando, legu rad-rono (PV)
- Post:rad-ringo aldonu bendo (S)
- Aldonu 19-20. pneŭmatiko (S)
- Post:aksingo, aldonu: nabo (PV)
- Anst.vosta lampo legu rebrililo.

\* Waringhien: Grand Dictionnaire Esperanto-Francais. Paris 1957.

\*\* Clissold: Marista Terminero. Heronsgate 1950.

\*\*\* Waringhien: Suplemento de Plena Vortaro. Paris 1954.

\*\*\*\* Verda: Kudra kaj Trika Terminero. Heronsgate 1947.

Lars Kåre Hunnes.

Adiaŭa kanto

laŭ la internacia bone konata skota kanto.

Malnovajn gekonatojn iam  
ĉu forgesos ni?  
Ĉu la estintajn tagojn ĉiam  
ne memoras ni?

Feliĉan tempon la malnovan  
ne forgesu ni!  
Ni kune trinku tason ravan  
al fratharmoni'!

Geknaboj en la rivereton  
nudpiede ni  
igadis plaŭdi la ondeton;  
ne forgesu ni!

Feliĉan tempon...

Tra l' verda lekanteta valo  
ĝoje kuris ni;  
la bonodoron de l' konvalo  
tie ĝuis ni!

Feliĉan tempon...

Ni tuj la manojn interprenos,  
ronde kantu ni;  
estintaj tagoj ne revenos,  
sed memoru ni!

Feliĉan tempon...

Nia felietono:

LA MEVOJ - daŭrigita

Ni petas, ke ĉiu, kiu vidis lin aŭ trovas postsignojn de li, raportu al la polico. Tor Brattlien estas kvardek-kvinjara, fortika, li portas grizan vestaĵon, nigrajn malnovajn ŝuojn kaj havas nenion sur la kapo. Li facile koleriĝas, kaj povas esti danĝera."

"Bone, Jens. Vi raportas kiel vera skolto. Kion ni faru?"

Post kelka diskuto la planoj estas presaj. La roto iras en la arbaron por havi tendaron, kaj en la arbaro - nu, eble oni povas trovi aliajn postsignojn, kiuj montras la vojon de la frenezulo.

Baldaŭ la roto disdonis la taskojn por pretigi la hajkon, ja ne estas la unua tendaro de la mevoj.

## V

Sur terpinto ĉe la lago staras betula stango - kaj sur ĝi flirtas blua triangula flago kun blanka mevo. Inter la arboj staras du tendoj. Jen la somera tendaro de la mevoj. La trup-estro donis sian permeson, la gepatroj la siajn, ĉio estas en ordo, kaj la mevoj antaŭvidas gajajn tagojn en la arbaro.

La loko estas bela - kaj tre uzebla por tendaro. La terpinto havas ĉe unu flanko sablan bordon, kie estas agrabla banloko, sur la alia flanko tiklas malgranda rivereto, kiu venas de malgranda fonto inter la betuloj. La akvo tie estas tre bongusta, klara kaj malvarma. Sur la pinto la knaboj starigis la betulan flagstangon, kaj tie ili faris sian kuirejon kaj manĝ-salonon. La tablo estas falinta grandarbo. Per siaj hakiloj la knaboj faris la supron plata, ebena, kaj laŭ la trunko ili metis sep ŝtonojn. Tiuj estas iliaj seĝoj. La falinta arbo servas ankaŭ kiel ejo de la mangilaro kaj la kaseroloj, kaj kelkajn paŝojn for, la knaboj havas sian fajrejon. La mangiĝojn ili konservas en artefarita kelo - sed kiu ne konas ĝin, certe ne trovos ĝin. La ŝtono, kiu kovras la truon, aspektas kvazaŭ ĝi kuŝus tie dum jarmiloj.

La sola malagrabraĵo estas la necesejo. Oni ja devas havi ĝin, sed ne apud la tendoj, kaj ne apud la banloko. Do - oni devas iri laŭ la tuta terpinto por trovi konvenan lokon. Kaj nun du skoltoj transportas sablon el la banstrando tien, por ĉiufoje povi kovri ĉion per sablo.

Oni ne povas vidi la kabanon - aŭ la restaĵojn de la forbrulinta kabano - de la terpinto. Kaj pro tio la knaboj ĝojas. Kvankam ili ja ŝatas aventurojn, kaj ankaŭ intencas iom esplori la ruinojn kaj la cirkabaĵon, ili ne ŝatas rigardi la negrajn ŝtonojn tie.

Du tendojn ili havas. Arne dormas en unu, kune kun Jens, Per kaj Karl. En la alia la rota asistanto, Ole, prezidas, kaj kun li loĝas Sven kaj Lars. Per estas la plej juna, li ĵus trapasis la trian gradon, dum Ole, Jens, Sven kaj Lars ĉiuj havas la duan gradon, kaj Arne jam dum unu jaro havas la unuan gradon, kiun ĵus



ricevis ankaŭ Karl.

## VI

Sur ŝtono ĉe la lago sidas bruniĝinta knabo kaj rigardas laŭ la akvo. Nenion kaj ĉion le vidas, dum liaj kamaradoj jam naĝas en la akvo.

"Hej, venu ankaŭ vi! Ne restu tie!"

"Iom pli da sunumo. Estas tiel agrable."

Sed subite - liaj kamaradoj en la akvo vidas lin malaperi malantaŭ la ŝtono, kaj jam antaŭ ol ili povas demandi pri la kialo, ili aŭdas mevan blekon. Dufoje - trifoje.

Jens, kiu sidis tie, do vidis ion danĝeran aŭ ion pri kio li volas averti la aliajn. Kio povas esti?

Arne subakviĝas, naĝas sub la akvo, nur kelk-foje li devas veni al la supro por spiri, sed tuj denove subakviĝas. Tio estas lia specialaĵo, sed nun le sentas, ke tio estas iom pli. Tre singarde li alvenas al la ŝtono, kie estas Jens.

Kaj denove krias la mevo, sed nur per unu longa, vea bleko.

La aliaj obeas. La banado finiĝis jam, malgraŭ la bela vetero. La rotestro komandis - ili obeas.

\*

"Kio okazis?" Flustra demando, kaj flustra respondo.

"Jens vidis viron ce la alia bordo. Li portis grizajn vestojn, sed havis nenion sur la kapo. Eble estas la malaperinta frenezulo."

"Kion fari?"

"Unue ni devas iom manĝi, kaj pretigi manĝaĵon kiun ni kunportos. Ĉiu zorgu por si mem. Kaj la uniformojn ni devas porti. Silente. Sed rapide. Kiam mi denove blekas, venu al mi".

## VII

Ses knaboj en skoltaj uniformoj sidas ĉe la fajrejo. Neniu fajro brulas, neniu vorto aŭdiĝas. Jam ĉiu manĝis, kaj en la mano ĉiu havas sian manĝopakaĵon. Nur Arne mankas. Li jam foriris, kaj nun ili nur sidas: Kio okazos.

Jes - de la norda parto de la lago venus la me krio, estas la rotestro kiu vokas. Nun Ole prenas la komandon, kaj signe, ne vorte, li ordonas, ke la aliaj singarde sekvu. Rapide la ses knaboj iras norden laŭ - sed ne ĉe - la bordo. Neniu vidu ilin, nun ili vere volas uzi ĉiun sian lertecon.

Subite Ole haltas. "Jen kie Arne estis, dum li vokis nin". Sur la tero estas rapida desegnaĵo de birdo, kaj antaŭ la beko notsignon.

Ĉu ni nun restu ĉi tie?" Per demandis. Li ankoraŭ ne estas en la roto sufiĉe longe por koni ĉiujn sekretajn signojn.

"Ne. Arne petas, ke ni sekvu pluen", Karl diras, kaj montras al eta signo kiun Arne rapide faris pere de tri branĉetoj.

Kaj denove. Jam ili povas, kelkfoje, vidi la ruinojn de la kabano. Kaj ili scias, ke nun decas la absoluta singardemo. De tempo al tempo iu el la ses montras al kruco aŭ montrilo. Ili estas sur la ĝusta vojo. Arne jam iris ĉi tie.

Sed denove Ole haltas, ordonante al la aliaj tutan silenton. Li montras al nova skizo en la malseka tero. Estas viro. Sed apud la viro estas - jes, tio devas signifi pafilon.

La frenezulo do havas pafilon. Ĉu oni vere devas plueniri. Sed Arne ja iris.

La rotanoj rigardas unu la alian. Ĉiu pensas la samon, sed neniu rompas la silenton. Ĝis Ole eligas denove la mevan krion, kiun ili jam tiom uzis hodiaŭ. Nun li blekas la demandan signon, du longajn, veajn blekojn kun unu mallonga, kvazaŭ fortimigita kaj rompita.

Neniu respondas. Arne silentas, tio povas signifi, ke li estas tute apud la fremda viro. Do, Ole mansignas: Ni iru!

La postsignoj de Arne ne estas facile troveblaj. Nur la malgrandaj, intence faritaj, skoltaj signoj montras la vojon. Sed post kelka tempo ankaŭ tiuj forestas.

Kio okazis?

Tutcerte: Arne vidis la viron, kiu portas pafilon. Kaj li sekvis lin ĝis ĉi tie. Sed poste?

Nova mansigna komando: Iru ĉiu en sia direkto, sed tenu la kontakton!

TRUPAJ TENDAROJ  
Konsilo al Patrolestro  
de George Rust

Iam mi taksis (mi ne memoras la manieron kalkuli), ke la ĉefa somera tendado valoras por skolto cent vesperajn trup-kunvenojn. Vidu, kiom gravas tendadi kun la trupo.

Preparoj

Kontrolu viajn tendadajn objektojn. Se septembre vi ne zorge purigis la potojn, eble jam difektis rusto. Se septembre vi pakis en la konservejon tendojn ne tute sekaj, eble ili jam tiom ŝimis, ke levite ili tuj senbrue ŝiriĝos.

Planado

Planu la Tribunalo de Honoro: ne postulu, ke nur la trupestro laboru. Bona programo por la jaro (sed mi listos ilin laŭ inversa ordo) estas: (a) en agosto la ĉefa trupa tendaro de naŭ tagoj, kian mi nun priskribas; (b) en julio semajnfina tendado konkursa kontraŭ patroloj ali-trupaj; (c) en junio unu-du semajnfinaj tendadoj por via patrolo sola tiaj, kiajn mi priskribis en vol. 2 p.135; (d) je pentekosto tri-taga trupa tendado por kutimigi pri tendvivo la novulojn, ĉar, se ilia unua estus naŭtaga tendado, ili eble nostalgias; (e) je pasko (se tio estas ne tro frua) semajnfina tendado de nur la Tribunalo de Honoro, por ke ili ple sciu, ol iliaj patrolanoj.

Memoru 28 tagojn antaŭ la tendaro surskribi kaj poŝti al via distrikta komisaro la permespeton.

La Tendejo

La Tribunalo de Honoro eletu tendejon privatan, solecan: vi ne ĝuus ejon ekzemple apud vojo omnibusa! Akvon vi bezonos, kaj arbojn por brulaĵo; kaj akvo estas peza, kiam oni portas ĝin longe. Aliron vi bezonos por via veturilo: vi ne deziras manporti grandajn tendojn de la landvojo duonkilometron ĝis via soleca tendejo. Grundon vi deziras ne argila time, pri koto kaj akvo. Tro ebena tero, kaj pluvo kuŝos: tro dekliva, kaj dormante vi ruliĝos el via tendo. Proksime je la tendejo vi deziras monton, aŭ arbaron, aŭ riverbordon por naĝi, aŭ rivereton por superponti, aŭ erikejon por vastaj ludoj.

En la tendejo vi bezonos kompreneble sufiĉon da spaco, por ke ĉiu patrolo posedu proprajn dormtendon, provizan tendeton, kaj kuir-fajron; kaj ke patrolu distancu de patrolo proksimume cent metrojn.

### En la Tendejo


Demandu, de kie blovas la plej ofta vento; kaj decidu, ĉu vi deziras, ke fajreroj bloviĝu sur vian tendon. Arboj gardu viajn tendojn kontraŭ fortaj blovoj. Iuj konsilas, ke vi loku la necesojn alvente de la tendejo (t.e. en la direkto, kien blovas), por ke vi neniam malbone flaru; sed aliaj konsilas, ke devante plede, ke bone tenata necesejo ne odoras, kaj nun, se jes odoros, vi tuj scios. Kiun tendon vi deziros pli proksima je la patrolo fajrejo: la dorman aŭ la provizan?

Du truojn fosu en la patrola kuirejo. Unu el ili estas la Brulu-Batu-Bedu-truo: nutraĵajn lad-skatolojn brulinte (por ke muŝoj ne deziru ilin) kaj bateginte (por ke ili plenigu malpli da volumeno en la truo) enbedigu en la B-B-B-truo. La alia truo estas la elefanto-kaptilo: sur ĝi kuŝu plektita kaptilo el vergoj kun herbo aŭ filikoj aŭ urtikoj ciutage sternitaj sur ĝi; sur la kaptilon vi milde versŝos ĉian malpuran akvon, ĉar, se vi versŝus senpere en la truon, graso ŝtopus la porojn en la grundo, kaj baldaŭ ne plu da akvo forsorbiĝus. Bruleblaj aĵoj (ekzemple terpomaj ŝeloj) eniras neniun el tiuj truoj: ili iras sur la fajron.

Ankaŭ en la tendara necesejo fosu du truojn. Unu estas por urino; ĝia formo ne gravas. La alia estas por ekskremento: ĝia profundo estu ne pli ol duonmetro, ĉar la bakterioj, kiaj detruas ekskrementon, loĝas ne pli profunde; ĝia largo estu proksimume kvaronmetro, por ke via plej juna skolto uzante ĝin povu stari dis piede; kaj ĝia longo estu laŭ la templongo de via tendado. Havu po unu tia truo por ĉiu naŭo da tendantoj. Apud tiu truo havu paperon en kontraŭpluva skatolo. Havu ankaŭ ŝovelilon, per kiu ĉiu uzanto kovru sian ekskrementon per iom de la elfosita mola grundo, por ne logi muŝojn, kiuj emas aĉeti biletojn ira-reirajn inter la necesejo kaj la nutraĵa tendo. Ĉiu deziranta uzi la ekskrementan truon uzu antaŭe la urinan, por ke lia urino ne formovu iom de ies surŝovelita grundo. Kiam vi unue fosas tiujn du truojn, amasigu la elfositan grundon ne pli proksima ke truo ol 20 cm, por je uzanto ne malmoligu la molan grundon per sia ŝuo.

Daurigota.

PREĜO  
de la skolto



Sinjoro Jezuo, kiu al la mondo diris tion ĉi: "Estu Pretaj!" kaj donis al mi la gracon tion elekti kiel devizon, donacu al mi la favoron resti al ĝi fidela.

Faru, ke ĉiu viv-cirkonstanco trovu min preta por plenumi mian devon, plena de amo al la vero, kaj de fervoro por la bono, korligita al mia Eklezio, kaj fidela (al Reĝo kaj) Patrujo, pardonema, helpema, kun rideto surlipe eĉ dum sufero, pura laŭ koro kaj ĉasta laŭ korpo.

Tiel Vi antaŭeniris, ho Sinjoro. Vian vojon - kien ajn ĝi konduku - mi volas sekvi, lojale kaj libere, kun vireca koro kaj levita kapo.

Tio estas mia promeso kiel kristano kaj skolto.

Je mia honorvorto, me ĝin plenumos.

Min helpu, Sinjoro Jezuo, Via amo kaj graco.

Amen.

+++++

Tiu preĝo estas la preĝo de la katolikaj skoltoj en Belgujo. Ĝi same bone povas esti preĝo de kiu ajn kristana skolto.

+++++

Aŭskultu!

Nia vicprezidanto, Douglas Murphy, faros mallongan radio-predikon lundon 1a 2-an de Novembro je 23.40 M.E.T en la Radio Hilversum (402 metroj) kokaze de la programo "La Evangelio per Esperanto".

## Vicprezidanto vojaĝas

Dum Aŭgusto la Vicprezidanto partoprenis la KELI-Kongreson en Lunteren, apud Amersfoort en Nederlando, kaj tien bonvolis veni frato Harry Luijke el Katwijk aan Zee por renkonti lin. Ili havis tuttagankonversacion pri diversaj temoj kaj multe ĝuis la revidon: ili unuafoje renkontis unu la alian en la SEL-Tendaro en London en 1938 kiam ili dormis en la sama ĉambro, kaj ili duafoje vidis unu la alian okaze de la Beneluksa Kongreso en Hago en 1962, kiam tuthazarde, la organizantoj metis ilin en la sama litoĉambro! (post 24 jaroj!)

Antaŭ ol forlasi Lunteren, la Vicprezidanto estis vizitita de gefratoj Vincent van Dongen (Nelly van Dongen estis Nelly Krijnen, nia agentino por Nederlando) kiuj vizitis la Mondjamboreon en Britujo en 1957, kiam ili tranoktis ĉe la Vicprezidanto en Ipswich survoje al Sutton Coldfield. La Vicprezidanto kaj lia edzino kaj filo multe admiris la ĉarman unujaran Neeltje kaj la renkontiĝo kun la tuta familio van Dongen estis ege bona kulmino al la semajna Kongreso.

En Zaandam la familio Murphy havis la ĝojon viziti la gasteman hejmon de Ko Hammer, kaj tie ili trovis belan akcepton pere de S-ino Hammer kaj la junaj ĝeinfanoj. Antaŭ nur kelkaj semajnoj ankaŭ estis en tiu domo gefratoj Rosbach el Norvegujo, kaj la Vicprezidanto rimarkis la donacon kiun ili postlasis kiel memoraĵo. Ko dediĉis la tutan dimanĉon al siaj vizitantoj kaj la kelkhora kunesto en tiu tre ŝatata nederlanda hejmo en vere kristana kaj skolta etoso longe restos kiel benata memoro.

F.D.M.

Kiel mia bona  
ago hodiaŭ, mi  
proponas manĝi  
viajn dolĉaĵojn,  
ke vi ne detruu  
la dentojn!



#### Proksima numero

de La Skolta Mondo aperos en oktobro/novembro kiel vintra numero de nia gazeto.

Ni planas: Daŭrigon de la konsiloj pri trupaj tendaroj, same daŭrigon de la felietono. Kiel eltondo de alia skoltgazeto ni havos priskribon de neĝaj ŝuoj. Skoltan kenton ni kompreneble ankaŭ venontfoje donos, kaj kiel plenumo de la skolta promeso, ankaŭ religian paĝon.

Denove ni petas: Tiuj, kiuj havas informojn - ĉu eble pri io sur nacia kampo - aŭ artikolojn, aŭ en sia nacilingva skoltorgano trovas ion, kion ili konsideras valora, bonvolu sendi.

Adreso de la redakcio: "La skolta mondo", Hans Amund Rosbach, Follidal, Norvegujo.

SKOLTA ESPERANTISTA LIGO

(fondita en 1918)

Fondinto: "Avoto"

Honoraj Prezidantoj: "Avoto", Norman Booth, Kolonelo D.H. Davis

NACIAJ REPRESENTANTOJ

AŬSTRALIO: S-ro S.H. Milligan, 274 Mont Albert Road, Surrey Hills,  
E.10, Victoria

BELGUJO: S-ro Kamiel van Herp, Juul Moretuslei 312, Wilruk  
(Antwerpen)

BRAZILO: nomota

BRITUJO: S-ro C. Bardsley, 42 Westbourne Street, Oldham, Lancs.

DANLANDO: S-ro Sejer Holgersen, Einarsvej 99, Lyngby, Kopenhago

FINLANDO: nomota

FRANCUJO: nomota

GERMANUJO: nomota

HISPANUJO: S-ro A. Pedro Marqueta, Avenida de Valencia 32,  
Zaragoza

ITALUJO: Pietro Ferrara, Via Leandro Alberti 13, Bologna

JAPANUJO: S-ro Sinzo Sumiya, Daido Kagaku Sooti K.K.,  
16 Suehirotyo Kitatu, Osaka

KANADO: S-ro John H.F. Hoyle, Box 421, Forest, Ont.

NEDERLANDO: S-ro J.K. Hammer, Wibautstraat 33, Zaandam

NORVEGUJO: P.M. Hans Amund Rosbach, Follidal

PORTUGALUJO: S-ro Joao Patricio de Melo, Rua Jacinto Nunes 17-3<sup>o</sup>  
Dt<sup>o</sup>, Lisboa I

SVEDUJO: S-ro Curt Bohman, Fack 7, Högen

SVISLANDO: nomota

USONO: S-ro C.S. Otto, 7 Longview Road, Livingston, New Jersey

(Presita en Anglujo)

